



UvA-DARE (Digital Academic Repository)

Cent jarojn poste: la Zamenhofa filozofio kaj Esperanto = Cent' anni dopo: la filosofia di Zamenhof e l'esperanto

Gobbo, F.

[Link to publication](#)

Citation for published version (APA):

Gobbo, F. (2017). Cent jarojn poste: la Zamenhofa filozofio kaj Esperanto = Cent' anni dopo: la filosofia di Zamenhof e l'esperanto. Paper presented at Ludwik Zamenhof: 1859-1917, Rome, .

General rights

It is not permitted to download or to forward/distribute the text or part of it without the consent of the author(s) and/or copyright holder(s), other than for strictly personal, individual use, unless the work is under an open content license (like Creative Commons).

Disclaimer/Complaints regulations

If you believe that digital publication of certain material infringes any of your rights or (privacy) interests, please let the Library know, stating your reasons. In case of a legitimate complaint, the Library will make the material inaccessible and/or remove it from the website. Please Ask the Library: <http://uba.uva.nl/en/contact>, or a letter to: Library of the University of Amsterdam, Secretariat, Singel 425, 1012 WP Amsterdam, The Netherlands. You will be contacted as soon as possible.

Cent jarojn poste: la Zamenhofs filozofio kaj Esperanto / Cent'anni dopo: la filosofia di Zamenhof e l'esperanto

Federico Gobbo^{a,a},

^a *Universitatoj de Amsterdamo / Torino / Milano-Bicocca*

Resumo

Zamenhof laŭ Unesko estas granda personeco de la homaro pro tio, ke Unesko proklamis 2017 Zamenhofs Jaro, ĉar la aŭtoro de Esperanto forpasis en 1917. Kio postrestas de la Zamenhofs penso hodiaŭ, post cent jaroj ekde lia forpaso? En ĉi tiu teksto oni priskribas la fundamentajn tekstojn de Hilelismo kaj Homaranismo en komparo, kaj oni celas eltiri instruojn por la homoj vivantaj en la dudek-unua jarcento.

Riassunto. Zamenhof è considerato dall'UNESCO una grande personalità dell'umanità e perciò il 2017 è stato proclamato Anno Zamenhofiano, perché l'autore dell'esperanto è mancato nel 1917. Cosa rimane del pensiero di Zamenhof oggi, a cento anni dalla sua morte? In questo testo vengono descritti i testi fondamentali dell'Hillelismo e dell'Homaranismo a confronto, e si cerca di estrarne degli insegnamenti per gli uomini del ventunesimo secolo.

Serĉvortoj: Zamenhof, Hilelismo, Homaranismo, Hillelismo

* Miaj elkoraj dankvortoj pro la provlegado de la manuskripto iras al: / Personali ringraziamenti per la rilettura del manoscritto vanno a: Fabrizio A. Pennacchietti.

Retadreso: F.Gobbo@uva.nl (Federico Gobbo)

URL: <http://federicogobbo.name> (Federico Gobbo)

¹ Universiteit van Amsterdam, Faculteit der Geesteswetenschappen, Taal- en letterkunde, Spuistraat 134, 1012 VT Amsterdam, Nederland.

² Università degli Studi di Torino, StudiUm, Palazzetto Gorresio, via Giulia di Barolo 3/A, 10124, Torino, Italia.

1. Enkonduko

La figuro de Zamenhof estas la plej studata en la historio de Esperanto por tute evidentaj kialoj: li estas la fondinto de la ‘lingvo internacia’, por uzi la originan nomon de lia planlingvo. Tamen, la ‘lingvo internacia’ ne estis por li la ĉefa parto de lia projekto pri profunda reformo de la homaro sed nur la unua ŝtupo. Fakte, Esperanto devintus esti nur la lingva instrumento por realigi la unuigon de la homaro en ‘unu granda rondo familia’, alia fama Zamenhova esprimo. Male, devintus esti Hilelismo, t.e. la ‘pontoreligio’, la ĉefmotoro kiu efektivamente tian projekton, kiu tute nature venis – laŭ la Zamenhova opinio – kiel dua ŝtupo.

Ni nomu ĉi tie ĝeneralsence la tutan Zamenhofan projekton – Esperanto inkluzivite – *filozofio*, kies esenca karaktero estas etika kaj politika, kaj do ja koncernas la konvenan manieron vivi kun la aliuloj. La celo ĉi tie estas priskribi la ĉefajn karakterojn de la Zamenhova filozofio, kun aparta atento al la diferencoj inter Hilelismo, kronologie la unua versio, kaj Homaranismo, la dua – kaj lasta – versio. Post tiu ĉi prezento, ni klopodu analizi kio restas aktuala de la Zamenhova filozofio en la nuntempa mondo, alivorte kio jam realiĝis, kion oni devas ankoraŭ realigi kaj kio restas tute utopiisma.

2. Kial Esperanto ne sufiĉas

Kiel konate, Esperanto publikiĝis en 1887 – antaŭ 130 jaroj – kaj ĝi eliris la unuan fazon kiam serioze interesiĝis pri la lingvo la francoj. Laŭ la sociologia esploro de Garvía (1), ekde jaro 1900 estis pli da esperantistoj en Francio ol en la cara teritorio – Ruslando, kiu inkluzivis ankaŭ grandan parton de la nuntempa Pollando, kie siatempe loĝis la familio Zamenhof.

Ekde la unuaj jaroj de la dudeka jarcento, Esperanto ŝajnis esti sufiĉe stabila por ne pereji samkiel Volapuko. Tiu ĉi fakto certe stimulis Zamenhof pripensi Hilelismon pliprofunde, kiel li sin konfidis per privata letero kun unu el la fruaj ok verkistoj de la Esperanta lingvo (2), lia juda amiko Abraham Kofman. Ĉi tiu letero, verkita la 28an de majo 1901,

1. Introduzione

La figura di Zamenhof è la piú studiata nella storia dell’esperanto per motivi del tutto evidenti: è stato il fondatore della *lingvo internacia*, lingua internazionale, per usare il nome originale della sua lingua pianificata. Tuttavia, la lingua internazionale per lui non era la parte principale del suo progetto di profonda riforma dell’umanità, ma solo il primo passo. Difatti, l’esperanto sarebbe dovuto essere solo lo strumento linguistico per realizzare l’unificazione dell’umanità in una sola grande famiglia umana, per usare un’altra nota espressione Zamenhofiana. Al contrario, sarebbe dovuto essere l’Hillelismo, vale a dire la religione ponte, il motore principale per realizzare un tale progetto, che sarebbe avvenuto in maniera del tutto naturale – nell’opinione di Zamenhof – come secondo passo.

Chiamiamo qui in senso generale l’intero progetto di Zamenhof – Esperanto incluso – *filosofia*, il cui tratto principale è etico e politico, e perciò riguarda la maniera giusta di vivere assieme agli altri. Lo scopo qui è descrivere i caratteri principali della filosofia di Zamenhof, con un’attenzione particolare alle differenze tra l’Hillelismo, cronologicamente la prima versione, e l’Homaranismo, la seconda – e ultima – versione. Dopo questa presentazione, cercheremo di analizzare cosa resta attuale della filosofia di Zamenhof nel mondo contemporaneo, in altre parole cosa è stato fatto, cosa si deve ancora fare e cosa resta del tutto utopistico.

2. Perché l’esperanto non basta

Com’è noto, l’esperanto è stato pubblicato nel 1887 – 130 anni fa – e uscì dalla prima fase quando si interessarono seriamente della lingua i francesi. Secondo lo studio sociologico di Garvía (1), a partire dall’anno 1900, c’erano piú esperantisti in Francia che nel territorio della Russia zarista – che includeva anche gran parte dell’attuale Polonia, dove viveva a suo tempo la famiglia Zamenhof.

A partire dai primi anni del ventesimo secolo, l’esperanto sembrava sufficientemente stabile per non perire al pari del Volapük. Questo fatto di certo aveva stimolato Zamenhof nel riflettere piú a fondo sull’Hillelismo, come si confidò con una lettera privata con uno dei primi scrittori in lingua (2), il suo amico ebreo Abraham Kofman. Que-

enhavas rimarkindajn ideojn:³

sta lettera, scritta il 28 maggio 1901, contiene idee ragguardevoli.³

³Ĉiuj eltiraĵoj venas de la volumo *Originala Verkaro* (3), kaj por simpleco mi indikos ĝin sekve tra la teksto per la siglo *OV*. Paĝindikoj aldoniĝos poste.

³Tutti gli estratti vengono dal volume *Originala Verkaro* (3), e per semplicità lo indicherò *infra* con la sigla *OV*. I numeri di pagina verranno aggiunti in un secondo momento.

Se eĉ ĉiuj akademioj de la mondo akceptus Esperanton, se eĉ milionoj da personoj ĝin uzadus, nenio garantias, ke en la daŭro de unu jaro ĝi subite ne estos forĵetita kaj forgesita por eterne! Se ĝi unu fojon “eliros el la modo”, ĝi plej rapide pereos por ĉiam. Lingvo Internacia fortikiĝos por ĉiam nur en tia okazo, se ekzistos ia grupo da homoj, kiuj akceptus ĝin kiel sian lingvon familian, heredan.

Centoj da tiaj homoj estas por la ideo de lingvo neŭtrala multe pli grava ol milionoj da aliaj homoj. Hereda lingvo de la plej malgranda kaj plej sensignifa popolo havas vivon multe pli garantiitan kaj neestingeban, ol senpopola lingvo, kiun uzus eĉ milionoj da homoj. Jes, mi estas profunde konvinkita, ke nek solvo de la hebrea demando, nek enradikiĝo de lingvo neŭtrala estos iam ebla sen hilelismo, t. e. sen kreo de neŭtrala popolo. (*OV*)

[Se tutti gli accademici del mondo accettassero l'esperanto, anche se milioni di persone lo usassero con continuità, nulla garantisce, che nel giro di un anno venga d'un tratto buttato via e dimenticato per sempre! Se per caso andasse “fuori moda”, perirebbe con la massima velocità e per sempre. La lingua internazionale si fortificherà per sempre solo nel caso in cui esistesse un gruppo di persone che lo accettassero come propria lingua familiare, ereditaria.

Un centinaio di tali persone sarebbero per l'idea della lingua neutrale di gran lunga più importanti di milioni di altre persone. Una lingua ereditaria del popolo più piccolo e insignificante ha una vita molto più garantita e inestinguibile di una lingua senza un popolo, che venisse usata da milioni di persone. Sí, sono profondamente convinto, che né la soluzione della questione ebraica, né il radicamento di una lingua neutrale sarebbero possibili senza Hillelismo, cioè senza la creazione di un popolo neutrale.]

Klaras, ke laŭ Zamenhof tiu ĉi ‘neŭtrala popolo’ devus paroli Esperanton kiel familian, heredan lingvon, kaj ke kerno de tiu ĉi popolo estu la judoj. Tiu ĉi ideo malfermas du problemojn al Zamenhof: unue, kiel rilati Esperanton al la ‘hebrea demando’; due, kiel rilati Esperanton al Hilelismo. Pasis la jaroj, kaj la laboro por Esperanto iĝas pli prema kaj forta. En 1905, post la unua Universala Kongreso en Bulonjo-ĉe-Mar, Zamenhof estis preskaŭ certa, ke la estonteco de la lingvo ne plu estas en grava danĝero. Li do sin konfidis kun alia grava juda amiko, kiu subtenas Esperanton, Émile Javal. En la 24a de septembro 1905 Zamenhof skribas:

Chiaramente secondo Zamenhof questo *neŭtrala popolo*, popolo neutrale, dovrebbe parlare esperanto come lingua familiare, ereditaria, e il nucleo di questo popolo sono gli ebrei. Questa idea apre due problemi per Zamenhof: primo, come si relaziona l'esperanto con la “questione ebraica”; secondo, come si relaziona l'esperanto con l'Hillelismo. Passano gli anni, e il lavoro per l'esperanto diventa più pressante e intenso. Nel 1905, dopo il primo Congresso Mondiale Esperanto a Boulogne-sur-Mer, Zamenhof è praticamente certo che il futuro della lingua non è più in grave pericolo. Allora si confida con un altro suo importante amico ebreo che sostiene l'esperanto, Émile Javal. Il 24 settembre 1905 Zamenhof scrive:

Tiu ĉi malgranda popolo, kiu havas sian konstantan kulturen centron en unu el la urboj de la neŭtrala Svisujo, prezentus fundamentan grupon, kiu iom post iom ensorbus en sin ĉiam pli da homoj el ĉiuj nacioj kaj estus la komenco de la estonta lingve kaj religie unuigita homaro. (*OV*)

[Questo piccolo popolo, che avrebbe il suo centro culturale permanente in una delle città della

neutrale Svizzera, rappresenterebbe un gruppo fondamentale, che un po' per volta assorbirebbe in sé sempre più uomini da tutte le nazioni e sarebbe l'inizio di un'umanità futura unita per lingua e per religione.]

En 1905 estis jam sufiĉe klara, ke la nova ŝtato de Israelo realiĝos en Palestino, kiel proklamite en la Unua Cionisma Kongreso en 1897. Zamenhof komencas meti distancon inter si kaj la destino de la juda popolo: neŭtrala popolo havu sian naturan patrujon en neŭtrala lando, Svislando; la hebrea demando ne estas plu menciita. La dua Universala Kongreso, planita en Ĝenevo en 1906, estus do la ideala loko kaj momento por lanĉi la duan ŝtupon de la projekto, t.e. la pontoreligio.

Unue li publikigis broŝuron en la rusa, titoligita *Hilelismo*; poste, en la sama jaro, li publikigis alian version kun la titolo *Homaranismo*, celitan al la esperantistoj. Evidente malfacile li povis doni la saman mesaĝon al du diversaj celgrupoj, nome la ruslandaj judoj kaj la esperantistoj. Ĉiukaze, li klarigas, ke:

Oni ne devas intermiksi la hilelismon kun la esperantismo! Ambaŭ ideoj estas tre parencaj inter si, sed tute ne identaj. Oni povas esti bonega esperantisto kaj tamen kontraŭulo de la hilelismo. (OV)

[Non bisogna scambiare l'hillelismo con l'esperantismo! Entrambe le idee sono molto vicine tra loro, ma non sono del tutto identiche. Si può essere un ottimo esperantista e tuttavia oppositore dell'hillelismo.]

Laŭ mi indas rimarki la lastan frazon. Ŝajnas, ke li anticipu sciis, ke alvenos malfavoraj reagoj al Hilelismo. Tuj sube, li klarigas pri kio la broŝuro temas.

La hilelismo estas instruo, kiu, ne deŝirante la homon de lia natura patrujo, nek de lia lingvo, nek de lia religio, donas al li la eblon eviti ĉian malverecon kaj kontraŭparolojn en siaj naciareligiaj principoj kaj komunikigadi kun homoj de ĉiuj lingvoj kaj religioj sur fundamento neŭtrale-homa, sur principoj de reciproka frateco, egaleco kaj justeco. (OV)

[L'hillelismo è una dottrina che, non intendendo distaccare l'uomo dalla sua patria naturale, né dalla sua lingua, né dalla sua religione, gli offre la possibilità di evitare falsità di ogni sorta e obiezioni nei propri principi nazional-religiosi e di comunicare con uomini di tutte le lingue e religioni su un fondamento neutrale-umano, su principi di reciproca fraternità, uguaglianza e giustizia.]

Zamenhof asertas, ke unuaflanke Hilelismo respektas la diversecon de nacioj, kiuj tiam estis difinitaj ĉefe per lingvoj kaj religioj, sed aliflanke agas kiel antidoto al ĉiaj naciismoj kaj ksenofobioj, por uzi nuntempaj esprimoj.

Nel 1905 era già abbastanza chiaro che il nuovo stato di Israele si sarebbe realizzato in Palestina, come proclamato nel Primo Congresso Sionista nel 1897. Zamenhof inizia a mettere una distanza tra sé e i destini del popolo ebraico: il popolo neutrale abbia la sua patria naturale in un Paese neutrale, la Svizzera; la questione ebraica non viene più menzionata. Il secondo Congresso Mondiale di Esperanto, da tenersi a Ginevra nel 1906, sarebbe stato dunque il luogo e il momento ideale per lanciare il secondo passo del progetto, vale a dire la religione ponte.

Dapprima pubblica una brochure in russo, intitolata *Hillelismo*; in seguito ma nello stesso anno, pubblica un'altra versione con il titolo *Homarano* – che significa membro della specie umana – destinata agli esperantisti. Evidentemente era difficile poter dare lo stesso messaggio a due diversi destinatari, vale a dire gli ebrei russi e gli esperantisti. In ogni caso, chiarisce che:

Ritengo importante sottolineare l'ultima frase. Sembra che sapesse già in anticipo che sarebbero arrivate reazioni negative all'Hillelismo. Subito sotto, chiarisce di cosa si tratta.

Zamenhof dice che da un lato l'Hillelismo rispetta la diversità delle nazioni, che allora erano definite principalmente attraverso le lingue e le religioni, ma dall'altro lato agisce come antidoto a nazionalismi e xenofobie di ogni genere, per usare una terminologia

Krome, notindas, ke du el la tri principoj venas de la Franca Revolucio: tie estis ‘libereco, egaleco, frateco’, ĉi tie oni legas ‘frateco, egaleco, kaj justeco’. En la Zamenhofa versio, anstataŭ ‘libereco’ estas ‘justeco’, kaj krome, ‘frateco’ aperas unuavice, male al la originala versio. Do, Hilelismo prezentigas laŭ la intencoj de la aŭtoro kiel laika kaj laikiga programo, etika kaj politika.

3. Ekde Hilelismo al Homaranismo

Zamenhof prave timis, ke la reagoj al Hilelismo povu esti malfavoraj. Famas la forta kontraŭstaro publike farita de la katolika pastro, Aleksandro Dombrovski, fakulo pri matematiko, pionira esperantisto kaj litova nacia patrioto, aparte grava en la historio de la kultura vivo de Litovio ĝis la morto en 1938. Oni ne forgesu, ke tiam Litovio estis nur geografia esprimo.⁴ Nehazarde kelkaj pioniraj esperantistoj kiuj batalis por la rekono de siaj religiaj kaj lingvaj identecoj povis malfavori Hilelismon, ĉar la laikaj elementoj en ĝi estis esprimitaj per religia lingvaĵo, tiel, ke Hilelismo povis aperi kiel rivalo de kristanismo. Kiam Zamenhof komprenis tion, li ellaboris denove sian proponon, kaj li bezonis separojn antaŭ ol publikigi novan version de la propono, ĉi-foje klare nomita Homaranismo, esprimita per pli kohere laika lingvaĵo. La lasta versio de lia propono – ne plu religiema – aperos en Madrido en 1913.

Sed, ĉu estas alia fonto inter 1906 kaj 1913 kiu povas helpi al ni kompreni kial Zamenhof sentis la bezonon revizii sian proponon? Bonŝance, jes, sed iom paradokse ĉi tiu fonto estas en la angla. Temas pri la ununura intervjuo kiun Zamenhof koncedis al ĵurnalo en sia tuta vivo. La ĵurnalo estas *The Jewish Chronicle*, Juda Kroniko, kaj la intervjuo okazis tuj post la tria Universala Kongreso en Kembriĝo, en la somero de 1907. La intervjuanto estas rabeno de juda reformkongregacio Isidor Harris. Grandan spacon li donis al la kerno de la Hilelisma propono, kiun la intervjuato identigas kun la formiĝo de ‘normala sekto’, kiu eĥas la esprimon ‘neŭtrala popolo’ pri kiu ni legis en la privata letero de 1901 menciita dekomence. Sube aperas eliro en

⁴Laŭ la esploro de Lins (4), Dombrovski estis kondamnita en 1889 al kvinjara ekzilo en norda Ruslando ĉar li malpermesis al siaj gefiloj iri al ortodoksa lernejo.

aktuale.

Inoltre, va notato che due dei tre principi provengono dalla Rivoluzione Francese: lì si diceva ‘libertà, uguaglianza, fraternità’; qui si legge ‘fraternità, uguaglianza e giustizia’. Nella versione di Zamenhof, anziché libertà c’è giustizia, e inoltre ‘fraternità’ compare al primo posto, al contrario della versione originale. Perciò, l’Hilelismo si presenta secondo le intenzioni del suo autore come un programma etico-politico laico e laicizzante.

3. Dall’Hilelismo all’Homaranismo

Zamenhof aveva ragione a temere che le reazioni all’Hilelismo potessero essere sfavorevoli. È nota la forte opposizione fatta pubblicamente da Aleksandras Dambrauskas, prete cattolico, esperto di matematica, pioniere dell’esperanto e patriota lituano, estremamente importante nella vita culturale della Lituania fino alla sua morte nel 1938. Si ricordi che allora la Lituania era solo una espressione geografica.⁴ Non casualmente certi esperantisti della prima ora che lottavano per il riconoscimento delle proprie identità religiose e linguistiche potevano essere sfavorevoli nei confronti dell’Hilelismo, perché gli elementi laici in esso contenuti erano stati espressi mediante un linguaggio religioso, cosicché l’Hilelismo poteva sembrare un rivale del cristianesimo. Quando Zamenhof comprese questo, elaborò nuovamente la sua proposta ed ebbe bisogno di sette anni prima di pubblicarne una nuova versione, questa volta esplicitamente chiamata Homaranismo, espressa attraverso un linguaggio più coerentemente laico. L’ultima versione della sua proposta – non più fraintendibile con una religione fatta e finita – uscirà a Madrid nel 1913.

Ma esiste un’altra fonte tra il 1906 e il 1913 che possa aiutarci a chiarire perché Zamenhof sentì il bisogno di queste revisioni? Per fortuna, sí, ma un po’ paradossalmente questa fonte è in inglese. Si tratta della sola intervista che Zamenhof concesse a un giornale in tutta la sua vita. Il giornale è *The Jewish Chronicle*, e l’intervista ebbe luogo subito dopo il terzo Congresso Mondiale di Esperanto a Cambridge, nell’estate del 1907. L’intervistatore è il rabbino di una congregazione ebraica riformista, Isidor Harris. Grande spazio è lasciato al cuore

⁴Secondo lo studio di Lins (4), Dambrauskas fu condannato nel 1889 a cinque anni di esilio nel nord della Russia perché aveva proibito ai propri figli di andare alla scuola ortodossa.

la angla originalo kaj en la esperantigo – kiu aperis origine en *La Nica Literatura Revuo* – fare de Maimon, la aŭtoro de la ĉefverko *la kaŝita vivo de zamenhof*⁵.

⁵La aŭtoro verkis la tutan libron sen uzi majusklojn.

Inasmuch as all Jews have a history in common, and the peoples will have nothing to do with us, we ought to beware of calling ourselves 'Russians,' 'Germans,' etc., and we should call ourselves 'Jews' by nationality ; always remembering that, unlike other nationalities, ours is neither local nor ethnological, but only ideal. It stands to reason that we cannot reform the whole Jewish people at one step. So we ought to create in Judaism a normal sect, and strive to bring it about that that sect may come, in course of time—say, after 100 or 150 years—to include the whole Jewish people. We should then become a powerful group. Nay, more, we should be in a position to conquer the civilised world with our ideas, as the Christians have hitherto succeeded in doing, though they only commenced by being a small Jewish body. Instead of being absorbed by the Christian world, we shall absorb them; [but the Russian Jews] had not the courage to help me in organising such a sect as I contemplated. There is a Russian proverb that [says] 'One man in a camp does not make a soldier.' So I have long since abandoned my scheme as unworkable, and my efforts are now devoted to the cognate object of furthering the movement which I have called Esperantism.

Pro tio, ke ĉiuj hebreoj havas komunan historion kaj la popoloj ne volas komunikiĝadi kun ni, ni tute ne nomu nin rusoj, germanoj ktp, sed nomu nin ĉiam hebreoj laŭ nacieco. Kaj ni bone memoru, ke nia nacieco, malsimile al aliaj, estas nek loka nek etnologia, sed pure idea. Estas afero tute komprenebla, ke ni ne povas reformi la tutan hebrean popolon per unu fojo. Tial ni devas krei normalan hebrean sekton en la judismo kaj klopodi, ke tiu sekto multiĝu kaj kresku tiamaniere, ke kun paso de la tempo ni diru: post 100-150 jaroj – ĝi ensorbos en sin la tutan hebrean popolon. Tiam ni estos potenca grupo. Eĉ pli, ni povos akiri per niaj ideoj la tutan civilizitan mondon, kiel ĝis nun la kristanoj kun sukceso faris, kvankam ili komencis kiel malgranda hebrea grupo. Anstataŭ esti ensorbitaj en la kristana mondo, ni ĝin ensorbos. [Sed] mi trovis nenium, kiu volis subteni min, por starigi la sekton, kiun mi celis fondi. Ekzistas rusa proverbo: "Unu soldato militon ne faras". Pro tio mi jam de longe forĵetis tiun projekton, kiu montriĝis nepraktika, kaj mi laboradas nun per mia tuta forto por simila celo, nome, por la movado, al kiu mi donis la nomon "Esperantismo".

[Poiché tutti gli ebrei hanno una storia in comune, e i popoli non hanno nulla a che fare con noi, dobbiamo stare attenti a farci chiamare 'russi', 'tedeschi', ecc., e dovremmo chiamarci da soli 'ebrei' come nazionalità, ricordando sempre che, a differenza delle altre nazionalità, la nostra non è né locale né etnica, ma solo ideale. È ragionevole pensare che non si può riformare tutto il popolo ebraico in un colpo solo. Così bisogna creare dentro l'ebraismo una setta normale, e lottare perché nel giro di diciamo 100 o 150 anni possa includere tutto il popolo ebraico. Allora dovremmo diventare un gruppo potente. Ancora di piú, saremmo nella posizione di conquistare il mondo civilizzato con le nostre idee, come i cristiani sono di fatto riusciti a fare, a partire da un piccolo gruppo ebraico. Invece di essere assorbiti dal mondo cristiano, dovremmo assorbirlo; [ma gli ebrei russi] non ebbero il coraggio di aiutarmi a organizzare una setta cosí come l'avevo contemplata. C'è un proverbio russo che dice: 'un uomo sul campo non fa un soldato [una rondine non fa primavera]'. Per questo da tempo ormai ho abbandonato il mio scopo in quanto irrealizzabile, e tutte le mie forze sono ora dedicate a uno scopo simile, che consiste nel movimento che ho chiamato 'esperantismo'.]

Unuflanke, la judaro prenis la direkton de nacia revigliĝo malsama ol la Zamenhofa ideo, ke judismo estu ĉefe se ne nur nacieco ‘sole ideala’, aliflanke la ideo absorbi kristanisman povis nur pravigi la opozitantajn reagojn fare de esperantistoj kiel Dombrowski.

Ĉiokaze, malgraŭ la asertoj en la intervjuo en jaro 1907, Esperanto kaj esperantismo ne sufiĉis al Zamenhof, do li reellaboris profunde sian filozofion, ĉi-foje kun la celo esti akceptata fare de la esperantistaro kiel celgrupo. En la sekvo, ni do konsideru valida la tekston de 1913, kiel la plej kompletan version de la Zamenhofa filozofio, dum la antaŭajn versiojn ni vidu nur sporade per kontrasto, por pli bone kompreni ĝian evoluon.

1. Mi estas homo, kaj la tutan homaron mi rigardas kiel unu familion; la dividitecon de la homaro en diversajn reciproke malamikajn gentojn kaj gentreligiajn komunumojn mi rigardas kiel unu el la plej grandaj malfeliĉoj, kiu pli aŭ malpli frue devas malaperi kaj kies malaperon mi devas akceladi laŭ mia povo.

[1. Io sono un essere umano, e tutta l'umanità la considero come una sola famiglia; la divisione dell'umanità in popoli diversi reciprocamente nemici e in comunità nazionali e religiose la considero una delle piú grandi fonti di infelicità, che prima o poi dovranno sparire e alla cui sparizione devo contribuire secondo le mie possibilità.]

4. Aktualeco de la Zamenhofa filozofio

Tuj supre oni povas legi la unuan principon de Homaranismo el la dek entutaj. La unua subfrazo estas rekta traduko de la latina esprimo *homo sum*, atribuita al Terencio⁶, kiun Zamenhof uzis kiel kaŝnomon. Do, Homaranismo havas sian radikojn en la klasika humanisma tradicio.

La dua principo komencas per la sekvaj vortoj: “mi vidas en ĉiu homo nur homon, kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj agoj.” Mi nomas ĝin ekde nun principo de *universala egaleco*, kaj ĝi estas kvazaŭ natura konsekvenco de la unua. Oni povas diri, ke formale ĝi estas agnoskita de la Unuiĝintaj Nacioj en simila formo: jen mesaĝo de Zamenhof kiu rekte nerekte alvenis ĝeneralan rekonon, almenaŭ teorie. La tria punkto priskribas kion oni nomas nuntempe *principo de teritorieco*:

⁶Grava romia verkisto, Terencio estis sklavo, poste liberigita. Li estas ĝenerale konsiderata la fondinto de la humanista kulturo.

Da un lato il popolo ebraico aveva preso una direzione di rinascita nazionale distante dall'idea di Zamenhof che l'ebraismo sia innanzitutto una nazionalità ‘solo ideale’, dall'altro l'idea di assorbire il cristianesimo non poteva che dar ragione alle reazioni di opposizione da parte di esperantisti come Dambrauskas.

Comunque, nonostante quanto dichiarato nell'intervista dell'anno 1907, l'esperanto e l'esperantismo non erano abbastanza per Zamenhof, così rielaborò profondamente la sua filosofia, questa volta con lo scopo di essere accettato da parte degli esperantisti come destinatari privilegiati. Nel proseguo, consideriamo valido il testo del 1913 come la versione piú completa della filosofia Zamenhofiana, mentre le versioni precedenti le vediamo solo sporadicamente per contrasto, in modo da comprendere bene la sua evoluzione.

4. Attualità della filosofia di Zamenhof

Subito sopra si può leggere il primo principio dell'Homaranismo dei dieci totali. Il primo sintagma è la traduzione diretta della locuzione latina *homo sum*, attribuita a Terenzio⁵, che Zamenhof usò come pseudonimo. Quindi, l'Homaranismo ha le sue radici nella traduzione umanistica classica.

Il secondo principio comincia con le parole seguenti: “vedo in ogni essere umano solo un essere umano, e considero ogni essere umano solo secondo il suo valore personale e le sue azioni.” Chiamo questo principio da ora *uguaglianza universale*, ed è quasi una conseguenza naturale del primo principio. Si può affermare che formalmente è stato riconosciuto dall'Onu in una forma molto simile: ecco un messaggio di Zamenhof che direttamente o

⁵Importante scrittore romano, Terenzio fu schiavo, poi liberato. Viene considerato generalmente il fondatore della cultura umanistica.

meno ha raggiunto un riconoscimento generale, almeno in teoria. Il terzo punto descrive ciò che oggi viene chiamato *principio di territorialità*:

3. Mi konscias, ke ĉiu lando apartenas ne al tiu aŭ alia gento, sed plene egalrajte al ĉiuj siaj loĝantoj, kian ajn supozatan devenon, lingvon, religion aŭ socian rolon ili havas; [...]

3. Io credo che ogni Paese appartenga non a una o un'altra gente, ma a buon diritto ugualmente a tutti i suoi abitanti, qualsiasi origine, lingua, religione o ruolo sociale essi abbiano; [...]

Same kiel la universala egaleco, la principo de teritorieco, kie civitanoj estas egalrajtaj laŭ deveno, sekso, aĝo, religio, estas sufiĉe larĝe agnoskita.

Analogamente all'uguaglianza universale, il principio di territorialità, dove i cittadini hanno eguali diritti per principio indipendentemente dall'origine, sesso, età, religione, è riconosciuto in larga maggioranza.

4. Mi konscias, ke ĉiu regno kaj ĉiu provinco devas porti nomon neŭtrale-geografian, sed ne la nomon de ia gento, lingvo aŭ religio, ĉar la gentaj nomoj, kiujn portas ankoraŭ multaj landoj de la malnova lando, estas la ĉefa kaŭzo, pro kiu la loĝantoj de unu supozata deveno rigardas sin kiel mastrojn super la loĝantoj de alia deveno. [...]

[4. Sono consapevole che ogni Stato o provincia deve portare un nome geograficamente neutrale, e non il nome di un popolo, lingua o religione, perché i nomi etnici che ancora vengono usati in molti Stati del Vecchio Mondo, sono la causa principale secondo la quale gli abitanti di una supposta origine si considerano superiori agli abitanti di altra origine. [...]]

Male, la kvara principo, pri la *neŭtralaj landonomoj*, estas komplete utopiisma. En la antaŭa versio de lia propono Zamenhof donis ekzemplojn de neŭtrale-geografiaj landonomoj: 'Svisujo, Belgujo, Aŭstrujo, Kanado, Meksiko, Peruo; Peterburgregno, Parizregno; Algerio, Varsovilando.' Eĉ en la plej ĝisostula esperantista revo, oficialigi Esperanton kiel ĉies duan lingvon – ekzemple per la Unuigintaj Nacioj – Esperanto ne anstataŭus la aliajn lingvojn en la publika lingva pejzaĝo, plej bonŝance ĝi iĝos kunoficiala kaj la nomoj estus dulingvaj, kiel ekzemple en Sudtirolo. Ekzemple, neniam nederlandanoj akceptos kiel *ununuran* nomon por sia patrujo 'Amsterdamlando'! Analoge oni povas argumenti pri la principoj por la neŭtralaj nomoj.

Pli efektiveblaj estas la principoj ses kaj ok, ĉar ili postulas ŝangon en la percepto de propra nacia, lingva kaj religia identeco. Neniel oni rajtas konsideri identecon Di-jure pravigita kaj pro tio aŭtomate pli grava ol ĉiuj aliaj, ĉar tio implikas malrespekton al la fundamenta principo de Homaranismo, "mi estas homo", *homo sum*.

La deka kaj lasta principo koncernas la rilaton kun la religio, kaj ĝi estas dividita en tri subpartoj. Simile al la rilato kun la patriotismo, aparteno al eklezio estas akceptebla nur ĝis la punkto kiam ĝi malpermesas al la individuo 'malami aŭ persekuti

Al contrario, il quarto principio, sui *nomi geografici neutrali*, è del tutto utopico. Nella versione precedente della sua proposta Zamenhof fornì degli esempi di nomi di Paese neutrali: 'Svizzera, Belgio, Austria, Canada, Messico, Perù; Petroburgolandia, Parigilandia; Algeria; Varsovilandia.' Anche nei sogni più reconditi dell'esperantista più estremo, ufficializzare l'esperanto come lingua seconda di tutti – per esempio attraverso l'Onu – l'esperanto non prenderebbe il posto delle altre lingue nella toponomastica, al massimo diventerebbe co-ufficiale e ci sarebbero nomi bilingui, come per esempio in Alto Adige / Südtirol. Per esempio, mai i neerlandesi accetteranno come *unico* nome della loro patria 'Amsterdamlandia'! Analogamente si può argomentare sui principi che descrivono gli altri nomi neutrali.

Più realizzabili sono i principi sei e otto, perché richiedono un cambiamento della percezione della propria identità nazionale, linguistica e religiosa. In nessun modo si può considerare un'identità giustificata per diritto divino e perciò automaticamente più importante di tutte le altre, perché questo implicherebbe violare il principio fondamentale dell'Homaranismo "io sono un essere umano", *homo sum*.

Il decimo e ultimo principio riguarda la relazione con la religione, ed è diviso in tre sottopar-

iun pro tio, ke lia kredo pri Dio estas alia ol mia.’

Zamenhof nomas Dion ‘nekomprenebla Forto’, por jeti ponton inter kredantoj kaj nekredantoj. En filozofiaj terminoj, li povas esti difinita *diiŝto*, tio estas homo kiu kredas en supera persona Estaĵo, kies trajtoj ne estas homformaj. Lia Dio ne similas al la Dio de Spinozo: *Deus sive natura*, latine por ‘Dio alivorte naturo’ ĉar Dio estas persono. En la dua subparto oni povas legi eĥojn de la instruoj de Jesuo kaj Kant: ‘agu kun aliuloj tiel, kiel vi dezirus, ke aliuloj agu kun vi: ĉion alian en la religio mi rigardas kiel aldonojn.’ Je la fino, estas ankaŭ klara mencio al liberkredantoj. Ŝajnas al mi, ke la ideala homaranisto laŭ Zamenhof estu aŭ milda kredanto, prefere diisto aŭ akcepteble agnostikulo – li eksplicite mencias ateismon kiel nuran opcion.

Ni ne scias, ĉu Zamenhof sciis pri la vivhistorio de Auguste Comte, la fondinto de pozitivismo, kiu en la lasta fazo de sia vivo provis fondi novan religion bazata sur Scienco. Certe pro tiu ĉi klopodo Comte restis tre sola je la fino de sia vivo. Tio feliĉe ne okazis al Zamenhof, ĉar danke al la vivanteco de Esperanto li trovis aŭskultantaron kiu ankoraŭ vivas post cent jaroj, en 2017, kiel atestas ĉi tiu okazo.

Ni vivas en epoko kiam malrespekto, maltolero kaj persekuto de alireligianoj kaj alinacianoj denove fortiĝas pro timo kaj nesekureco. Lerni Esperanton kaj praktiki ĝin Homaranisme estas vojo miaopinie pli kaj pli aktuala. Mi volas fini mian intervenon per la sekvaj vortoj de Zamenhof, sen komentoj.

ti. Similmente alla relazione con il patriottismo, l’appartenenza a una Chiesa è accettabile fino a che questa impedisce all’individuo di ‘odiare o perseguire qualcuno perché ha un credo in Dio diverso dal mio’.

Zamenhof chiama Dio ‘Forza incomprensibile’, per gettare un ponte tra credenti e non credenti. In termini filosofici, può essere definito un *teista*, cioè un uomo che crede in un Essere superiore i cui tratti non sono antropomorfi. Il suo Dio non assomiglia al Dio di Spinoza: *Deus sive natura*, locuzione latina per ‘Dio ovvero la Natura’, perché Dio è una persona. Nella seconda sottoparte si può leggere una eco degli insegnamenti di Gesù e Kant: ‘agisci con gli altri così come vorrestiche gli altri agiscano con te: tutto il resto nella religione lo considero commentario.’ Alla fine, c’è anche una menzione chiara ai liberi pensatori. A me sembra che l’homaranista ideale secondo Zamenhof sia o un credente tiepido, o preferibilmente un teista, ma anche un agnostico è accettabile – esplicitamente menziona l’ateismo solo come opzione.

Non sappiamo se Zamenhof fosse a conoscenza della storia della vita di Auguste Comte, il fondatore del Positivismo, che nell’ultima fase della sua vita ha provato a fondare una nuova religione basata sulla Scienza. Di certo per questo tentativo Comte rimase molto solo alla fine della sua vita. Per fortuna ciò non accadde a Zamenhof, e grazie alla vitalità dell’esperanto ha trovato un pubblico che ancora vive dopo cento anni, nel 2017, come questa occasione ne dà testimonianza.

Viviamo in un’epoca in cui mancanza di rispetto, intolleranza e persecuzione di chi ha un’altra religione o nazionalità di nuovo si fanno forti, per paura e insicurezza. Imparare l’esperanto e praticarlo in maniera homaranisma è a mio parere una via sempre più attuale. Voglio concludere il mio intervento con le seguenti parole di Zamenhof, senza commento.

[...] laŭ miaj konvinkoj, mi estas “homarano”, kaj mi ne povas ligi kun la celado kaj idealoj de speciala gento aŭ religio. [...] Estas vero, ke la nacionalismo de la gentoj premataj – kiel natura sindefenda reago – estas multe pli pardoninda, ol la nacionalismo de gentoj premantaj; sed, se la nacionalismo de la fortuloj estas nenobla, la nacionalismo de la malfortuloj estas neprudenta; ambaŭ naskas kaj subtenas unu la alian, kaj prezentas eraran rondon de malfeliĉoj, el kiuj la homaro neniam eliros, se ĉiu el ni ne oferos sian grupan memamon kaj ne penos stariĝi sur grundo tute neŭtrala.

[[...] secondo le mie convinzioni, io sono un “homarano”, e non posso legarmi con gli scopi e ideali di un popolo o religione in particolare. [...] È vero, che il nazionalismo dei popoli oppressi – come reazione di difesa naturale – è molto più meritevole di perdono, del nazionalismo dei popoli

oppressori; ma, se il nazionalismo dei forti è ignobile, il nazionalismo dei deboli è insensato; entrambi generano e nutrono l'uno dell'altro, e il risultato è un circolo vizioso di infelicità, da cui l'umanità non uscirà mai, a meno che non rinunciamo all'amor proprio del nostro gruppo facendo lo sforzo di porci su un terreno completamente neutrale.]

Pri la aŭtoro

Federico Gobbo (1974) estas ordinara profesoro en la Universitato de Amsterdamo por la speciala katedro Interlingvistiko kaj Esperanto. Li estas ankaŭ vizitanta profesoro en la Universitato de Torino.

Sull'autore

Federico Gobbo (1974) è professore ordinario all'Università di Amsterdam per la cattedra speciale Interlinguistica ed Esperanto. È anche *visiting professor* all'Università di Torino.

Agnosko

La ideoj kaj opinioj esprimitaj en ĉi tiu publikaĵo apartenas al la aŭtoro nur; ili ne necese koincidas kun la sponsoroj de la katedro en la Universitato de Amsterdamo, nome Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo.

La esploro portanta al ĉi tiuj rezultoj ricevis financadon de la Sepa Kadroprogramo de la Eŭropa Unio sub stipendi-akordo n-ro 613344 (Projekto MIME).

Dichiarazione

Le idee e le opinioni espresse in questa pubblicazione appartengono esclusivamente al suo autore; non necessariamente esse coincidono con lo sponsor della cattedra dell'Università di Amsterdam, cioè la *Wereld Esperanto-Vereniging* di Rotterdam.

La ricerca che ha portato a questi risultati ha ricevuto finanziamenti dal Settimo Programma Quadro dell'Unione Europea sull'accordo di finanziamento n. 613344 (Progetto MIME).

References

- [1] R. Garvía, *Esperanto and its rivals: the struggle for an international language*, Penn Press, 2015.
- [2] G. Sutton, *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto*, Mondial, New York, 2007.
- [3] J. Dietterle (Ed.), *Originala Verkaro*, Ferdinand Hirt & Sohn Esperanto-fako, 1929.
- [4] U. Lins, *La danĝera lingvo*, UEA, Rotterdam, 2017.